

Mihály Babits

Studo pri la hungara literaturo

Eŭropo ege malmulte konjektas pri la hungara spirito kaj, verdire, ĝis nun ĝi ankaŭ ne multe zorgis pri ĝi. La fragmentoj, kiuj el la hungara literaturo atingis eksterlandon, — ĉu hazarde, ĉu destinite rekte por internacia merkato — apenaŭ povis ĝin reprezenti; aŭ se jes, ili restis izolate kaj sen atento. Ne la unua kazo estas en la historio, ke eksterordinara katastrofo malkaŝas eksterordinarajn valorojn: Hungarlando devis iĝi viktimo de nekomprenebla politika eraro, por ke oni rimarku, ke tiu ĉi kaŝata malgranda popolo havas ion por doni al la mondo.

Kvankam la hungara animo dekomence estas destinita jeti novan kaj specialan voĉon en la eŭropan koncerton: kun la kapablo, kiu la neordinarajn ĥemiajn komponaĵojn destinas precipiti la plej neatenditajn kristalojn. La hungara animo estas vere stranga komponaĵo: kunmetiĝo de la plej malproksimaj elementoj. La fundamentan formon de ĝi pensado certe la lingvo determinas por ĉiam, kaj ne estas lingvo en Eŭropo, kiu laŭstrukture tiom diferencus de ĉiu alia eŭropa lingvo, kiel la hungara. La hungara voĉo ne havas parencon ĉi tie, eĉ, apenaŭ en la tuta mondo: io fora, fremda, azia eksonas en ĝi, rilate al kiu eĉ la rusa estas nur samradike ĝerminta frato de la okcidentaj fratidiomoj. Al tiu ĉi lingvo respondas stranga, flegma kaj tamen fajra, azia animo, realista observmaniero akirita inter grandaj riveroj kaj sur senfinaj stepoj, prudente garditaj popolkutimoj, speciale dura taktosento, tute apartmaniere evoluintaj kanto kaj muziko.

Sed ĉio ĉi apenaŭ havus pli multan intereson por la eŭropa kulturo, ol la primitiva aŭ fremda kulturo de ajna popolo, kaj la hungara literaturo pretendas pli multe da atento, ol ia etnografia kuriozaĵo. La hungara kulturo ne estas fremda al la eŭropa kulturo: sed ĝi estas ĝia speciala fratbranĉo, aŭ, pli ĝuste, ĝia spegubildo en la spegulo de alispeca animo — ĉar, ĉu alia lingvo ne signifas jam ankaŭ en si mem alispecan animon? Laŭdire, la

kaŭzo de certaj unuflankecoj de la greka spirito estas la *unu-lingveco*; kontraŭe la multlingva kulturo iĝas ankaŭ tiom pli plastika, kiel la stereoskopa fenomeno komponiĝinta el ĝemelaj bildoj. La hungara kulturo estas okcidenta de mil jaroj; sed la lingvo — kaj la animo — ankaŭ hodiaŭ estas orientaj; — ĉu por Eŭropo ne povas nepre signifi kuriozajn interesajojn kaj instruojn eĉ mem tiu ĉi mirinda *amalgamo*, kiu estas pli ol amalgamo: ne ia ekzotika kaj ĉi tie degeneranta importaĵo, sed grandioza plantaĵo de Eŭropo mem, kiu plantite en poton de fremda tero ricevis novajn kolorojn kaj novan odoron.

Jes, jam forpasis preskaŭ mil jaroj, de kiam Sankta Stefano dediĉis sian paganan landon al Sankta Maria — kiu ĉi foje estis rigardata kiel la diino de la Okcidenta Kulturo, ĉar la hungaro ne estis mistika laŭ temperamento, kaj dekomence li vidis en la nova religio prefere novan kulturon: tio estas: adaptiĝon al la nova ĉirkaŭaĵo, kiu ne toleris la paganajn, nomadajn morojn. Malfrua alveninto de l' granda popolmigrado, meze de ekkulturiganta kristana Eŭropo: se li ne kapablas adaptiĝi, li pereos. La hungaro vidis sian situacion kun plena prudento. Ankaŭ li havis ian kulturon; almenaŭ diojn; kaj kantojn, mitojn, eĉ literojn, por glori tiujn ĉi diojn. Ĉiujn ĉi nun li devis forgesi; eĉ la literojn, kiujn li ĝis tiam gravuris sur lignon: la pergameno bezonis aliajn literojn. Kun tiu ĉi forgeso komenciĝas la kulturo de l' eŭropa hungararo: amara komenco kaj nefacila tasko: ĝi kostis centjarojn. La malnovaj dioj estis obstinaj; sed fine ili devis retiriĝi antaŭ la politika rekono, antaŭ la prudento de popolo vivivola kaj vivipova. Ili retiriĝis kaj kaŝiĝis en la angulojn de l' lingvo, en la senkonsciajn kaŝejojn de l' animo, kaj sub la mantelajn faldojn de l' konkeranta nova religio, tiel bone, ke malfruaj poetoj kaj scienculoj eĉ ilian nomon ne povis malkovri.

Tiu ĉi procezo estas tipa procezo rilate al la eŭropa historio de l' hungara spirito. Tiu ĉi historio estas lukto inter Okcidento kaj Oriento; kaj ĉiu etapo de l' evoluo, ĉiu nova epoko de l' literaturhistorio estas nova malvenko de la malnovaj dioj, kiuj tamen ne lasas sin definitive venki; eĉ, kun obstina venĝo ili asimilas ĉion fremdan, transformas ĉion alvenintan, filtras ĉiun novan influon... Ili unua venĝo estas la spirita senfrukteco de l' hungara mezepoko: ĉar kian kulturon povis ja krei en la spirito de l' fremda asketismo eĉ la plej celkonscia adaptiĝo kaj plej sincera kulturvolvo? »De strigis, quae non sunt, nulla fiat mentio« — legiĝis reĝo Kálmán la Libroama kaj la sama prudento, kiu igis la hungaran popolon akcepti la kristanecon, malhelpis, ke la plantaĵo de l' mezepoka superstiĉa mistiko trovi en ĝi veran humon. Tiuj malnovaj dioj estis la dioj de l' naturo; kaj la hungararo vane klopodis kun plena bonintenco

adapti la mondrigardon, kiu anoncis la malestimon, eĉ neon de l' naturo. La fruktoj de l' eŭropa hungara kulturo nur tiam povis ekburĝoni, kiam ankaŭ la okcidenta animo mem revenis al la brilaj kaj dolĉaj fontoj de l' naturo: tio estas: en la tempo de l' renesanco.

Mi ne aludas nun al la efemera brilo de la kortegoj de l' renesancepokaj hungaraj monarkoj, en kiuj svarmis italaj artistoj kaj humanistoj, kaj kiun tiel rapide estingis la turka konkero. Sed nenia tempesto povis estingi la flamon, kiu fine koncipiĝis en la hungara animo; kaj la vera *representativ man* de l' hungara renesanco, samtempe la plej malnova granda hungara poeto, vivis jam en la tempo de krudaj bataloj, kaj falis en lukto kontraŭ la barbaroj. Tiu ĉi hungara Villon,* kiel oni nomas lin, estis fierega kaj aventurema ekzilito, sed ĉiam plie sinjoro, ol vagabondo. Inter siaj bataloj kaj galantaj amoj, kaj kuŝante apud sia ĉevalo sur la herbo, li legis italajn kaj latinajn renesancpoetojn, kaj tiuj ĉi sonoj de l' Okcidento liberigis en li la varman fantazion kaj pasiojn de l' Oriento, kiujn en lia raso tiel longe subpremis kaj mutigis ĝuste la religio de tiu ĉi Okcidento. Tiel li levis al arta kaj eŭropa alto la *florkantojn*, tiun ĉi paganan amkaj naturlirikon de l' malnova hungararo. Orienta bildriĉeco kaj biblia paralelismo karekterizas tiun ĉi lirikon, kiu, deveninte el la subpremitaj kaj nesubpremeblaj profundoj de l' popolo, influis kaj faris skolon en la plej altaj medioj, en la kasteloj de l' potencaj oligarkoj.

Dume la hungararo kun nova kaj nova impeto travivis la krizojn de l' fermentanta spirita vivo de l' Okcidento, samtempe vivante ankaŭ la krizon de sia vivo propra, gvidanta tra luktoj kaj ruiniĝoj kaj la krizon de sia plene konsciĝinta historia destino, kiuj du krizoj interkroĉiĝis strangmaniere. La hungaro sentis sin gardisto de l' okcidenta civilizo sur la defendbastiono de l' Oriento; sed ĉu li ne devis gardi ankaŭ sian propran orientan individuecon, ĝuste kontraŭ tiu ĉi Okcidento, kiun en lia najbareco simbolis la centraliza Habsburg-potenco? Okcidenton travadis la reformacio kaj kontraŭreformacio; kaj ankaŭ Hungarlando havis siajn furiozajn kredpolemikistojn kaj havis ankaŭ sian propran Bossuet, strangan, krude popolradikan Bossuet,** kiu tamen sciis levi je arta nivelo la hungaran prozon, kiu formiĝis en tiuj ĉi bataloj. Sed tiuj ĉi bataloj ĉi tie iris trans la disputon religian kaj literaturan: temis pri la destino kaj ekzisto de l' nacio. Katolikismo signifis iom ankaŭ Aŭstrion, kaj protestantismo preskaŭ la turkon — ĉar ĝi trovis azilon nur sub la ŝirmo de l' turko: kaj ĉio ĉi kune Okcidenton kaj Orienton, inter kiuj kiel tragika

* Bálint Balassa.

** Péter Pázmány.

pendolo svingiĝadis tiu ĉi strangfata popolo. La hungararo sentis, ke ĝia sorto ne estas ĝia propra. La genio de l' Homaro starigis ĝin sur la limon de du civilizoj, kaj la hungara animo kun plena konscio akceptis tiun ĉi paradoksan sorton. Ĝin reprezentas la granda hungara epopeo de l' XVII. centjaro, kiun verkis Zrinyi, unu el tiuj aristokrataj poetoj, kiu samtempe estis la plej granda armeestro de l' bataloj kontraŭ la turkoj, verkisto politika kaj militscienca, kaj ŝtatviro kun kulturo staranta sur la supro de l' epoko. Post antaŭaj senvaloraj versaj kronikoj, lerninte ĉe Vergilius kaj Tasso, li kreis malhelan kaj fatalan epopeon de l' kristanismo: ĉar lia heroo, kiu estis ankaŭ lia avo, suferas por la tuta kristanaro sian destinitan de Dio kaj akceptitan memvole martirecon, kiu estas ankaŭ la martireco de l' poeto, de l' uta hungararo.

Kaj la heroo, kiel lia poeto kaj popolo, sciis bone, ke li estas sola, forlasite sola en tiu ĉi martireco, kiun Vieno kaj la tuta Eŭropo ignoras kaj elprofitas. Tiu ĉi tragika fetsento koloras malhela la arĥaik-versan hungaran epopeon, kiu, eĉ en sia orienta kolorpompo, estas malproksime de la petola muziko de Tasso; kaj ĝi pentras tragika ankaŭ la hungaran vivon, kiu staras inter la sovaĝa barbareco, kiel malŝatata gardisto kaj senespera amanto de l' kulturo. Eĉ se pormomente, dum ĝiaj liberbataloj kontraŭ Aŭstrio, ĝia vivtena instinkto pelas ĝin en la brakojn de l' konkeranta turko, la spirito de tiu ĉi popolo obstine kroĉiĝas al tiu de l' Okcidento. La eta Transilvanio, inter siaj sovaĝaj neĝpintoj kaj bataloj kreas tutan malgrandan francan kulturinsulon, kie troviĝas hungaraj *Saint-Simon* kaj hungaraj *Sévigné*. Protestanta pastro iĝas apostolo de Descartes. Rákóczi estas ligano de la Sunreĝo kaj mem franca verkisto. Kaj tamen, ĝuste la animo transilvana kaj *kuruca*,* kiu konstante protestas kontraŭ Aŭstrio, reprezentas la plej radikan, plej popolfortan hungararon; la hungaraj *Saint-Simon* kaj *Sévigné* estas vere hungaroj; kaj la hungara popolliriko neniam elŝprucis kun pli praa forto, ol en la kantoj de la triumfaj, poste mal-esperiĝintaj, venkitaj kaj elmigrintaj kurucoj de Rákóczi.

Sed la kurucaj kantoj iĝis cignokantoj de l' malnova hungara literaturo. Post la malvenko la aŭstra spirito sursidis la nacion kun sia plena prema potenco; kaj tiu ĉi estis ia centraliza, preskaŭ internacia spirito. Ĉiu nacia fortostreĉo ŝajnis ĉi tie donkihota iluzio, kaj la sola ebla kulturo estis tiu veninta el Vieno. La aŭstria kortego celkonscie germanigis la lernejojn kaj oficejojn, kaj Marta Terezia logis la aristokratajn hungarajn junulojn en Vienon, por ke, edukiginte en la nivelanta spirito de l' *Gesammtmonarchie*** ili forgesu eĉ sian gepatran lingvon. Tiamaniere la hungara lingvo iĝis

* *Kurucoj*: soldatoj en la libermilitoj hungaraj komence de 18. jc.

** Tutmonarkio.

neglektita rustika idiomo: eĉ la meznobela klaso prefere parolis en siaj bienoj — la latinan lingvon. La hungara spirito ree retiriĝis al la popolo, kiel la malnovaj dioj en la mezepoko, kaj meze de l' XVIII. centjaro la hungara literaturo verdire tute ne ekzistis.

Sed malĝuste kalkulis, kiu kredis, ke per la ĉarmoj de l' okcidenta kulturo oni povas delogi la hungaron de sia propra kulturo. Kontraŭe: ĉiu kontakto kun la granda okcidenta kulturo vekis kaj rememorigis: kiel la arbo rememorigas pri la floro, kiun ĝia branĉo ĝermigis, kaj kies velko kaptas nian koron. La renesanco de l' hungara kulturo venis de tie, de kie oni povis malpleje atendi: el Vieno; de la junuloj logitaj en Vienon, kiuj en la kortego de l' granda imperiestrino sorbis la internaciigintan francan spiriton. La vekigo de l' penso signifis la reviviĝon de l' lingvo. Honto kaj obstino ribelis. Baldaŭ balbutis hungaraj Rousseau kaj Voltaire; balbutis, mi diras, ĉar la lingvo regresis, malriĉiĝis dum tuta muta centjaro. Oni bezonis multege da novaj vortoj, plian fleksiĝemon en la parolturnoj, plian koncizecon kaj delikatecon rilate al la pezpaŝa kaj grasa malnova lingvo. Tiu ĉi lingvoreformo naskis fanatikajn apostolojn. Tuj ankaŭ fanatikajn kontraŭulojn. Tio estis lukto de Oriento kaj Okcidento, ĉapitro de l' grandioza kulturbatalo, kiu de Sankta Stefano daŭras ĝis hodiaŭ kaj plenigas la tutan internan historion de tiu ĉi popolo.

Kiu konas la aeron de l' hungaraj literaturaj disputoj, kiu ekzemple scias pri la bataloj de la plej novaj tempoj ĉirkaŭ la revuo *Nyugat* kaj la poezio de Andreo Ady, nefiniĝintaj eĉ hodiaŭ, tiu scias, ke la temperaturo de tiuj ĉi bataloj ege superas la ordinaran kaj kutiman intensecon de la literaturaj luktoj, kaj ĝi kvazaŭ alprenas proporcion de porekzistaj politikaj bataloj, kvazaŭ tiu ĉi nacio konjektus, ke ĝia vera ekzisto kaj destino havas kulturalan karakteron. Kaj la rezulto de l' bataloj estas tiu stranga *amalgamo*, pri kiu mi parolis: konstanta progreso kaj obstina fideleco samtempe, du nedisigeblaj dentradoj de Okcidento kaj Oriento, kiujn eĉ ĉiu salteto puŝas plu la fekunda kunkroĉigo de ili ambaŭ.

Tia fekundiga puŝo pruvigis la lingvoreformo: heroa fortoŝtremo por adapti malriĉan, neglektitan, azian lingvon al ĉiu esprimo kaj sonoro, kiun produktis la riĉhistoriaj lingvoj de l' grandaj eŭropaj nacioj. La rezulto estis neatendita malkovro: en tuta Eŭropo apenaŭ troviĝas pli fleksebla kaj pli ĉiopova ilo de l' animo ol la hungara lingvo. Kiu komprenas tiun ĉi lingvon kaj ekzemple havis okazon kompari okcidentajn poemojn kun iliaj plej bonaj hungaraj tradukoj, tiu ne trovos mian aserton troigita, se mi diras, ke la hungara lingvo povas preskaŭ ĉion esprimi same koncize, kiel la angla, same klare, kiel la franca, kaj, krom tio, kun plene sama sonoro, precize ĝi scias imiti ĉiun versformon de l' klasikaj kaj modernaj literaturoj.

Tiu ĉi neatendita riĉeco logis la unuan generacion al eklektikismo. La hungara spirito vere diboĉis en la provo de ĉiu formo kaj en la konkero de ĉiu provinco de l' Kulturo. Ĉiu konkero estis nova aromo, nova feliĉa bredkrucigo. La hungaro rimarkis, ke al li nenio estas fremda, kun nova intenso li rapidis travivi ĉiun novan kaj malnovan travivaĵon de l' homa spirito, kaj ĉio gajnis novan enhavon, kiam li ĝin travivis. Hungara poeto* tiutempe malkovris la belecon de l' mistikaj nuancoj, antaŭentoj, la filozofan melankolion, al kiu la melankolio de l' hungara malfeliĉo donis novan fonon. Alia poeto** kun horacaj taktoj provadis la horacajn kordojn de l' hungara prudento; sed la hungara prudento diferencas de la horaca. Ĝi estas ia *fajra prudento*, eĉ se paradokse: la klasikaj versoj en la buŝo de l' hungara poeto gajnis novan aromon, kiu ne estas malpli ongusta, kaj eble eĉ pli nobla, kaj nepre pli arda, ol tiu de l' latino. Malriĉa, vagabonda, juna poeto*** el la lernejo kaj tra la devio de l' plej moda itala kaj germana barok-poezio revenis al la ritmoj de l' plej freŝa kaj plej radika hungara popola liriko, kvankam ege riĉiĝinte kaj trasorb-iginte. Simbola devio: tiel revenas ankaŭ la hungara spirito, trasorb-iginte per la tuta riĉeco de Okcidento, tamen al si mem, sed al tia nova memo, kiu nun jam, eĉ se plej stranga membro de granda koncerto, portas en si la ŝarĝon kaj respondecon de l' tuta koncerto.

En la tuta Eŭropo la epoko de l' romantikismo estas ankaŭ la epoko de la naciaj reviviĝoj. Sed la profeto de l' hungara reviviĝo, la genia grafo Széchenyi, kiu, eksterlande edukiĝinte, faris la saman simbolan devion, konceptis la celon de sia mirindefika agitado en la sekvanta frazo: »Savi unu nacion por la homaro!«. Unu apartan koloron, kies velkiĝo, unu voĉon, kies mutiĝo estus bedaŭrinda! Ĉu ne estas surpriza la konscienco de tiu ĉi koncepto, ĉu ne estas nekutima tiu ĉi eŭropeco eĉ en la naciismo, ĝuste en la naciismo? Tragika eŭropeco, ĉar la donacon destinitan al Eŭropo nedankeme akceptis ĝuste la plej proksima Eŭropo, Aŭstrio, kaj la tuta moderna nacia vekigo kondukas nur al malfeliĉa revolucio, pro kiu la nacio preskaŭ mortas kaj ĝia profeto freneziĝas. La vivo de l' hungararo ne estas unu kaj kontinua vivo: ĉiam denove ĝi mortas kaj obstine reviviĝas. Ĝia historio estas serio de *Mohács-oj*:**** kiel la hungaroj nomas la grandajn naciajn katastrofojn laŭ la nomo de tiu fama batalo, post kiu iam preskaŭ la tuta lando disfalis kaj venis en turkan manon. tacio de l' kalvario daŭranta de Mohács ĝis Trianon estas ankaŭ la malvenko de l' libermilito en 1848, kiu jam kulminantan literaturon pelis sub la jugon de l'

* Ferenc Kölcsey (Kölĉei)

** Dániel Berzsenyi (Berŝenji).

*** Mihály Csokonay Vitéz (Ĉokonaj).

**** prononcu Moháč.

aŭstria cenzuro; tiam la hungara literaturo jam ne devis honti antaŭ la literaturo de ajna eŭropa popolo.

Almenaŭ: estis tie ĉi altoj, forŝirigintaj eroj de l' mirinda granda eŭropa ĉeno, kiujn eble nur la perspektivo de l' distanco montras malpli grandaj, ol la ĉefsuproj. Ekzemple la granda nacia poeto de l' hungara romantika epoko tiamaniere diferencas de la kutima kaj ĉiupopole sama tipo de l' patriot-poeto, ke mem tiu ĉi diferenco faras lin granda eŭropa poeto. La hungara bardo, *Vörösmarty*, travivas la patriotan senton el la vidpunkto de l' homaro, kiel Széchenyi, kaj tiun ĉi travivon plenigis per stranga febro lia konscio pri la tragika situacio de lia nacio en la »patrujo de l' popoloj«, al kiu ĝi kriis vane, kiu ĝin ne aŭdas, kaj indiferece ĉirkaŭstaras eĉ ĝian tombon. Tiu ĉi tragika sortosento, tiu ĉi speciala kaj fatala kazo, kondukas la hungaran poeton al tiaj problemoj de l' eŭropa naciismo, kiuj ankoraŭ hodiaŭ, eĉ, hodiaŭ pli ol iam, estas aktualaj. La poeto ne ĉesis esti orienta poeto, kvankam li fiksas antaŭ sin plene okcidentajn celojn: li ekiras de Vergilius, dezirante doni kvazaŭ hungaran *Aeneis*, sed lia verko iĝas pli simila al la *Mil Kaj Unu Noktoj* ol al *Aeneis*, malgraŭ la klasikaj heksametroj, al kiuj kompareblajn neniu skribis de post la epoko de Aŭgustus. Verdire, tiu ĉi bildriĉeco sorbiĝis en la porojn de l' lingvo, emajle trafajrigante la hungaran poezian stilon kvazaŭ per la simultana vido de la riĉaĵoj de l' mondo, per la gusto de l' senfino kaj neelĉerpeblo, kiu eĉ al la popolfabelaj poemoj donas apartan, filozofian elsonoron. Ĉio ĉi eĉ kreskigas la tragikan febron de l' poeto ĉenita al la problemoj de sia nacio, tiel, ke ĉi tiu febro fine ne havas lokon en la fluejo de l' disciplinita eposo kaj inundas en lirikon. Tiu ĉi liriko estas malegala kaj stumblanta: tamen en kelkaj poemoj, kaj precipe ĝuste tie, kie la poeto pleje perdas la ekvilibron de siaj pompaj bildoj kaj febraj sentoj, ĝi atingas la plej altajn suprojn de l' moderna eŭropa liriko. Ju pli la antaŭsento de la proksimiĝanta nacia katastrofo pliigas tiun ĉi malekvilibron, des pli alten ekflugas la aeroplano de l' liriko, kiel la maŝinoj, ĉe kiuj ĝuste la konstanta ekŝanceliĝo de l' ekvilibro estas la movforto. La afliktita poeto, nervmalsanulo kiel Széchenyi kaj alkoholisto, ĉar, kiel Ady diras, ĉiu hungara genio, kiu trasantas sian faton, pli aŭ malpli frue bezonas ebrion por povi vivi, — tiu ĉi vive-malviva poeto per tia stranga intenso frostotremigis tra siaj nervoj la fatteruron de l' homo, de tiu ĉi »freneza koto«, kiel tion eble eĉ ne povus filo de pli feliĉa nacio.

Sed tiutempe la nacio jam ebriiĝis de la voĉo de pli juna poeto, kiu estis malproksime de tiu ĉi tragika sento; lia juneco lin gardis de ĝi, kaj eble ankaŭ la slava sango, kiu fluis en liaj vejnoj: ĝi faris lin taŭga je la rolo de revolucia poeto, kiu sen la ŝarĝo de l' pasinto kaj sen la zorgoj de l' estonto elvivas la momentan

senton de l' nuntempo. Vere, apenaŭ estas en la mondliteraturo pli simpla poeto ol Petőfi; apenaŭ estas, el kiu la seninhibicia entuziasmo de l' juneco eruptus kun tia optimista ardo kaj spontana facileco, kaj eble ĝuste tiu ĉi facileco kaŭzas, ke el la hungaraj poetoj Petőfi iĝis la plej konata per tradukoj ankaŭ eksterlande. La simplaj formoj de l' hungara popolkanto spontane sin proponis kiel formoj de tiu ĉi junece facila kaj simpla poezio, tiom pli, ĉar la poeto estas la infano kaj batalanto de la demokratio, kiel la revolucio mem, kies heroo kaj martiro li iĝis. Sed oni ne opiniu, ke Petőfi estis neinteligenta kaj malklera popolpoeto, aŭ nur politika poeto de aktuala revolucio. En la spirito de tiu epoko la popola poezio estis fonto de ĉiu vera poezio; kaj ĝia kulto ne nur ne signifis nacian aŭ regionan izoligemon, sed male, vastigon kaj riĉigon, kiu identis kun la direkto de l' samtempa vastigo kaj riĉigo de la okcidenta kulturo. Tiu ĉi »popol-nacia« epoko de l' hungara literaturo tute ne volis forŝiriĝi de la eŭropa spirito, kaj Petőfi ne estis »natur-bubo«, kia oni lin kredigas kelkfoje. Karakteriza fakto, ke en 1848, en la ekscitita tempo senpere antaŭ la revolucio, la tri plej grandaj hungaraj poetoj, Vörösmarty, Petőfi kaj Arany — la du lastaj: standardportantoj de l' nova popola skolo — kuniĝis por traduki Shakespeare. Kiu povus forgesi, ke en tiu ĉi memorinda jaro la nacia afero de Hungarujo nedisigeble kroĉiĝis al la afero de l' eŭropa libereco kaj progreso? Petőfi, la bardo de l' nacia revolucio estas idealista socialisto kaj anarkisto: kaj en la mondliteraturo ne estas poeto, en kies animo la fajrokolonoj, gvidantaj la sonĝojn de l' Homaro, brilus kun tia pura kaj simpla lumo, nekovrite per la nebulo de l' Realo aŭ per la baroj de l' Ebloj. Tio ĉi estas la profete konkreta idealismo de la naiva kaj dia juneco, rilate al kiu Shelley estas malcerta revanto, Heine nekredema cinikulo, Hugo aktora pozisto. La idealismo de Petőfi pariĝas kun la grandioza sobreco de la hungararo, estas en li ia prahoma kaj prajuna freŝeco: Petőfi estas la poeto de l' idealoj, por kiuj li donis sian vivon, sed samtempe ankaŭ la poeto de la plej sanaj amkantoj kaj plej virge realistaj priskriboj. Kiel la »hungara stepo« aperas en liaj verkoj, tio estas la plej alta grado de l' poezia aperiga arto, tiom pli monumenta, ĉar preskaŭ senkonscia.

Tiu ĉi poezia realismo respondis al la spirito de la demokrata epoko, sed respondis ankaŭ al la naturo de la hungara psiko. Petőfin sekvis la alia granda hungara realisto, kies realismo atingis tute ĝis la naturalismo, longe antaŭ la formuligo de l' okcidenteŭropa naturalismo. Tiu ĉi potenca kaj radika epikisto, Johano Arany, jam en sia unua granda poemo, ankoraŭ kvazaŭ skolano de Petőfi, kreis eternan kaj rustikan tipon de l' suprenstrebanta demokrata hungararo, personiginte lin en la monumente konkretigita figuro de duone mita, duone historia hungara

Heraklo. Sed la viv-ŝvela Heraklo-figuro estas kreaĵo de trosentema kaj pudora poeto, kiu, ju pli li rifuĝas al ĉiam pli konscienca realismo kaj ĉiam pli simplaj naciaj formoj, des pli certe li sukcesas atingi la senkomparan arton de l' poezia plastiko, kaj modli la praan hungaran eposan version — kiu parenças al la franca aleksandro — en riĉan kaj proprece sonoratan modernan muzikilon. Dum la aŭstra subpremo eruptas ankaŭ lia liriko, kaj se la imperio de Vörösmarty estas febro, tiu de Petöfi ardo, tiun de Arany oni kutimas diri melankolio. Lia poeta rigoro pelas lin descendi en la plej mallumajn, preskaŭ senkonsolajn regionojn de la hungara popolvivo, kaj samtempe leviĝi ĝis la plej alta nivelo de la versarto kaj literatura kono. Vera *poeta doctus* li estas, kun la plena rafineco de l' moderna bardo, kaj la fremdulo ne povas eĉ imagi, kiajn komplikajn sonorajn kapablas liaj vortoj, sen ke ili perdus sian rustikan saĝan aromon. Lia arto iom similas al tiu de Tennyson, ankaŭ li estas konscia moderniganto de la nacia eposo, konstruante potencan eposan trilogion el la prahungaraj mitoj de la paganaj tempoj, kiu grupiĝas ĉirkaŭ la figuro de Attila, reĝo hunna, kaj kiu en pluraj punktoj interese kontaktiĝas kun la germanaj mitoj. La hungaroj akceptis Attilan kiel sian, kiu sur la sama loko de Eŭropo ektendis kiel ili, kaj li iĝas la Artus de tiu ĉi hungara ciklo. Sed Arany tamen ne estas Tennyson: lin distingas lia potenca konstruanta arto, kiu konstruas el granito, kaj ne en pavilon-sistemo kiel lia angla kolego; kaj nenio estas en li ankaŭ el la dolĉa facileco de Tennyson. Tiu ĉi naturalista poeto ne povas perdiĝi en prerafaelajn rafinaĵojn: kaj kvankam la eleganteco de liaj versoj neniom cedas al la Tennyson-versoj, la harmonio de lia arto estas for de la ludema artismo; liaj multe admirataj baladoj estas koncizaj Shakespeare-tragedioj, kiuj kulminas en la pripentro de l' kulpa konscienco, kaj ekzemple lia fratemurdanta Attila estas serioza nacia moralajo, kaj samtempe ĉefverko de la plej kruela psikoanalizo. La pli malfrua eposo de Arany ĝenerale tendencas al la analitika psikologia romano, en tio memorigante anstataŭ Tennyson plie pri Browning: dum samtempe en lia liriko aperas kvazaŭ fiziologie plena desegno de la suferoj de l' maljuneco kaj unua rebrilo de la impresoj de l' moderna urba vivo.

Arany estas antaŭtempa al la grandaj britaj poetoj, al kiuj mi lin komparis, kaj li estas samtempa al la unua ekburgoniĝo de l' hungara romano. Heroa disvolviĝo de grandaj individuecoj, en malprograsa kaj primitiva socio, kreas ĉian lirikan kulturon, kaj en kio la hungara spirito produktis la plej altan, en kio ĝi triumfe povas konkuri kun ajna nacio de l' mondo: tio vere estas ĝia liriko. Krom tio la grandioza hungara literaturo preskaŭ tute ne havis publikon: kaj la romanon la publiko kreas, preskaŭ tiom, kiom la verkistoj: la Publiko, kiu estas samtempe materialo kaj

konsumanto de l' Romano. Tiel okazis, ke ankaŭ la homvida kaj vivspegula forto de l' hungara animo manifestiĝis nur en versoj, ĝis la demokratiĝo de l' cirkonstancoj alportis pli modernan socian vivon. Tiam ekleviĝis ankaŭ la Romano, kaj preskaŭ tuj ĝi atingis zeniton, servante tiun ĉi demokratian transformiĝon per socia celado — el la plumo de filozofema ŝtatviro, — aŭ rigardante inter la radojn de l' Historio, kiu tiel estas vere *magistra vitae*. *Kemény* kiun oni nomas »hungara *Balzac*«, en siaj temoj memorigas plie pri *Walter Scott*: minante la pasinton de la malgranda montoza kaj aventura Transilvanio, kiel *Scott* tiun de Skotlando. Sed tiu ĉi historio ne estas tiu de l' dekoracioj kaj kostumoj; lin interesas la »subajo« de l' okazaĵoj, la fatala ludo de motivoj, la sekretaj risortoj de l' Politiko, la lavangoj ekruliĝintaj pro la plej eta movo, kaj tiu terura Etika Fato, kiu teksas eĉ ne el niaj grandaj pekoj, sed el niaj etaj homaj malfortoj kaj preskaŭ nerimarkitaj eraroj la malluman tragikon de nia vivo. La fadenoj de tiu ĉi teksaĵo estas animaj fadenoj kaj verdire kelkaj ĉapitroj de la *Kemény*-romanoj scenas preskaŭ tute en la profundo de l' animo, antaŭante la plej modernajn kaj — preskaŭ mi diris — plej psikoanalitikajn formojn de l' *monologo interna* aŭ pliĝuste *dialogo interna*.

Lia rigora realo-sento kaj lia rigardo en la sekretojn de l' homaj okazaĵoj levas *Kemény* en la vicon de l' plej grandaj politikaj publicistoj. Lia politiko ne estas plu tiu de *Kossuth*, sed tiu de *Deák*: saĝa kompromiso de tragike falinta nacio, kiu kondukas al la fondo de l' aŭstro-hungara monarkio. Malmulte simpatia kompromiso antaŭ la hungara animo, sed ĝi donas pacon kaj eblon por la kultura kaj socia evoluo. En tiu ĉi epoko de laca rezigno kaj negoca aktiveco, la alta liriko eksilentas provizore, kaj la romano iĝas reganta artospeco: sed baldaŭ jam ne la arto de *Kemény* vivsekcianta profundajn sekretojn kaj elfosanta amarajn verojn, sed la romano amuza, ŝvebiga, mildiga, efikanta per la sorĉo de l' arto kaj humuro. La gvidantaj verkistoj de l' epoko estas *Jókai* kaj *Mikszáth*; ambaŭ estas konataj ankaŭ eksterlande: ili faris la stilon de l' hungara rakonto preskaŭ orĉiste facila tiel, ke apud ĝi kelkfoje eĉ la plej amuza fremda verkisto ŝajnas malfacila, malrapida. *Jókai* estas rekta posteulo de la orientaj fabelistoj, kiu ĉiun pezon ĵetas el sia ŝipo: kaj la ŝipo kun mirinda glateco saltas al la plej riĉaj kaj plej fantaziaj songbordoj, kiuj venas kaj foriĝas... Eble en traduko multfoje tio efikas kiel ordinara aventurromano, ĉar mankas el ĝi la neelĉerpeble riĉa sorĉfluo kaj flugiga forto de l' hungara vorto. Eble la mondo de tiuj ĉi romanoj ŝajnas disiĝi en la malrealon, kie la baroj de l' realo disfalas, kaj la heroo, kiel la reĝido de l' fabeloj, kun nesingarda facileco traglitas en la Neeblon. Sed en tiu ĉi malrealo kaŝiĝas pli profunda realo: la realeco de l' orienta popolanimo, kiu ne toleras la katenojn de tiu ĉi

moderna, griza kompromisa vivo; ia popolfabela radikeco, kiun krome, kiel radikon la arbosuko, trasorbe vivplenigas ankaŭ tiu sobra humuro, kiu estas propra al la hungaraj popolfabeloj. Jókai estas trofekunda kaj malegala verkisto, kiu konfidas sian plumon al la inspiro de l' momento: sed kie tiu ĉi inspiro estas kun li, li scias preskaŭ ĉion kaj estas hejme ĉie, en la drasta realo same, kiel en la Utopioj de l' Tempo kaj Spaco. Li estas pli ol hungara *Dumas père* kaj precipe inter liaj pli mallongaj noveloj, kaj en la fantazia kaj en la humura speco, troviĝas, kiuj konkuras ankaŭ kun la verkoj de la plej seriozaj eŭropaj verkistoj.

Dum Jókai fabelas: Mikszáth anekdotas; kaj ankaŭ tio estas maniero rifuĝi de la realo. La humuro, kiu ĉe Jókai estas rebrilo de l' realo en la sonĝmondo, ĉe Mikszáth estas eblo, ke li rigardu la realon ludo. La realista arto de Mikszáth certe estas komparebla al tiuj de la plej grandaj eŭropaj — precipe anglaj — verkistoj: nur la respondeco kaj seriozeco de l' granda verkisto mankas al li. Mikszáth estas poeto de la antaŭmilitaj jardekoj, kaj li estas iom apatia kaj kompromisema, kiel lia epoko. Li ĉiam emas rigardi la pli amuzan flankon de la aferoj; por la senmoraleco kaj senfrukteco de l' platiĝinta epoko li havas maksimume nur rideton. La hungara rustika sobreco kaj flegmo ĉe li kelkfoje koaglas en cinikismon: tamen kontraŭ la ekstrema cinikeco defendas lin la radika humuro kaj la amo al la vivo.

Mikszáth estas tipo de la literaturo de l' epoko, kiu descende de la piedestalo de l' alta poezio iĝis esploranto de l' ĉiutaga vivo. Tiuj, kiuj restis en la alto, — precipe transvivantoj de la pasinta granda generacio — ne vidis kaŭzon por gajo. Estas strange, sed tiuj ĉi jaroj, kiuj estis jaroj de neniam esperita materiala kaj socia ekprospero de Hungarujo, samtempe, en la plej profundaj hungaraj animoj, estis jaroj de la plej dezerta pesimismo. La pesimismo estas natura korelativo de la senideala epoko: kvankam la tiama hungara vivo povis ŝajni serena al malmultpretendaj kaj praktikaj okuloj. Tio klarigas, kial penadis la lasta granda lirikista samtempulo de Petőfi kaj Arany* pri la plej mallumaj problemoj de l' sencelaj vivo kaj morto: kaj kial trovis la junaj, de Schopenhauer influitaj poetoj de tiu ĉi epoko la solan sencon de l' tuta mondo en la momenta humoro (hangulat: Stimmung): hungariginte tiun ĉi germanan vorton kaj koncepton. La vera sinteza genio de l' epoko estas Madách, la aŭtoro de l' *Tragedio de l' Homo*, kiu jam legeblas en tradukoj de pluraj eŭropaj lingvoj. La *Tragedio de l' Homo* estas vera universala verko: anstataŭ la senceleco de l' hungara vivo en ĝi jam temas pri la senceleco de l' homa vivo, en kadro de grandioza konstruo, kiu montras la tutan homan historion, kun siaj vanaj ekflamiĝoj

* János Vajda.

kaj seniluziigoj, ne pli konsole kaj multfoje kun ne pli malgranda sarkasmo, ol la verkoj de Voltaire aŭ Anatole France. Sed ĉiam pli serioze, kun ia puritana seriozo kaj nkoraŭ pli puritana poezio. Oni kutimas kompari la verkon de Madách kun la Faŭsto de Goethe, kaj oni trovas, ke Goethe estas plie poeto, kaj Madách plie filozofa. La vero estas, ke ambaŭ estas poetoj, nur tute alispecaj poetoj: ilia parenceco ekzistas nur en eksterajoj. Madách estas vera avarparola profeto, kiu jam trasentas la maltrankvilojn de l' modernaj socialaj problemoj, vere profete, ĉar en la hungara vivo tiuj ĉi maltrankviloj tiam ankoraŭ apenaŭ komencis vekigi. Madách estas monumente objektiva kaj lin ne timigas eĉ la plej ekstremaj konsekvencoj: lia verko estas unu el la plej potencaj eksperimentoj de l' homa spirito por sente kaj etike okulfiksi sian sorton.

La *Tragedio de l' Homo*, kiu rikoltis sukceson ankaŭ sur la scenejo, samtempe estas la ĉefverko de l' hungara dramliteraturo. Jen pri kiu mi parolis ankoraŭ nenion, kaj vere, dum la epokoj de l' hungara historio apenaŭ ekzistis teatro kaj scenejo, kaj la hungara dramo ne povas prezenti unuarangan verkon, eble escepte de Shakespeare-stila historia tragedio (*Bánk Bán*), kiu devenas ankoraŭ el la tempo de l' lingvoreformo, kaj prezentas la karakterizan konflikton de lojaleco kaj patriotismo en la hungara animo. Poste la tekniko de l' hungara teatrajverkado evoluis same jonglelerta, kiel tiu de l' romano, kaj atingis mondtrafikan signifon: tio jam okazas en la tempo de la negoca orientado de la teatro, kio kondukas for de la pura literaturo. Tamen tie ĉi oni devas mencii la konatan nomon de Francisko Molnár, kiu estas ne nur sceneja aŭtoro, sed ankaŭ eminenta verkisto.

Sed kiom ajn da eminentaj verkistoj vivis kaj laboris: en tiuj ĉi grizaj jardekoj la hungara literaturo descendis de sia vera trono kaj demetis sian kronon. La libroeldono ekfloris, la komuna kulturo leviĝis, estis pli da legantoj ol iam ajn, kaj la verkistoj sciis servi al la leganto per facileco de stilo kaj glata tekniko ĝis tiam ne konjektitaj: sed esence tiu ĉi literaturo apenaŭ estis pli, ol la literaturo de afektita kaj prunteprenita rustikismo, de sentimentalaj flirtoj, eble de iom franca pikanteco, aŭ aliparte de okaza kaj emfaza patriotismo. Kiel jam tiomfoje, ankaŭ nun eksplode venis la ŝanĝiĝo en la unuaj jaroj de la XX. centjaro, kaj grupe la talentoj, kiuj portis la ŝanĝiĝon: vekigo, batalo, vera kulturbatalo, nova standardo kaj tamen malnova, subita kaj nervoza eksalto. La hungara literaturo, fidele al sia eksogama naturo, ŝajne ricevis la forton ankaŭ nun de ekstere, kiel inversa Anteus: kaj la revuo de l' nova hungara literaturo skribis sur sian frunton la nomon Nyugat (Okcidento). Nova ligilo kun la novaj tendencoj de l' Okcidento signifis novan ligilon ĝuste kun

la plej malnovaj kaj plej profundaj problemoj de l' nacio; ĝi signifis la renovigon de la malnova batalo, kiun jam Sankta Stefano komencis iam, kaj kiu nun renoviĝis kun stranga akreco, post la sufoka trankvilo, kvazaŭ ĉe antaŭvespero de grandaj okazaĵoj. Ĝi signifis ankaŭ novan lingvoreformon kaj animorenovigon, kuriozan soifon je ĉiu novo, kun la nekontentigiteco de animo, de mil jaroj ĉiam denove interrompita en sia plenumiĝo. Kaj samtempe la memkritikon kaj memfidon de tiu ĉi animo: ĉar la sopiro estas sento de nesufiĉo, sed samtempe ankaŭ de nekontenteco, kaj kio alia estas la nekontenteco, ol konsciiĝo pri subpremita forto? La movado de l' Nyugat ree ekkirlis la konsciencon de l' hungararo kaj ĝuste pro tio ĝi vekis tiel impetan reakcion. La vorto Nyugat ne fiksas antaŭ sin la imiton de iaj novaj okcidentaj tendencoj, nur konsciiĝon pri ili, kaj konsciiĝon pri la situacio de la hungararo en la spirita vivo de l' moderna Eŭropo. Tio ne estas ŝiriĝo for de la malnova hungararo: kontraŭe, la trasento de l' novaj eŭropaj taskoj de l' hungararo kondukas al nova minado de ĉiu valoro kaj forto el la malnova minejo, kiu povas esti valoro kaj forto ankaŭ en la nova Eŭropo. Kaj vere tiu ĉi skolo, kiun en sia patrujo eĉ ankoraŭ hodiaŭ oni atakas plej impete kiel nenacian, donis tiajn verkojn al la eŭropa literaturo, kiuj ĝuste per la animkoloroj de tiu ĉi stranga nacio povas porti instigon kaj riĉiĝon al la Okcidento.

La rekonata gvidanto kaj unua klasikulo de la nova movado, Ady, ricevis la unuan veĉan puŝon en Parizo, — kiel la junuloj de Maria Terezia en Vieno — sed certe li povus redoni al Parizo tute alion ol kion li ricevis de ĝi. En lia patrujo oni serĉis en li la efikon de l' francaj dekadenculoj; kvankam tiu ĉi efiko estis nur kiel ŝtono ĵetita en fluidan materion, kiu ekirigas la procezon de l' kristaliĝo: la kristaloj tute ne similas al tiu ĉi ŝtono. Ady neniel estas dekadenculo: li estas avida kaj ardanta amanto de l' Vivo, kaj eĉ ne en la moda senco de l' artista travivo, sed en la pleneco de l' homa travivo. En lia poezio oni povas sekvi la evoluon kiel li konsciiĝas; kaj li, kiu komence sentis sin »parenculo de l' morto«, faras ĉiam pli kaj pli profundajn kaj filozofiajn konfesojn por la Vivo, kies nura servisto estas ankaŭ la Morte. Tiu ĉi vivo li heroldas ankaŭ al sia ĉiam vivostumbla nacio al kiu, en la momento de sia unua prezentiĝo, li ŝajnas renaŭtanta manto aperinta kvazaŭ sen antaŭuloj, kvankam lia rompo estas plie rekroĉiĝo al la problemoj de pli radikala hungara pasinteco transsaltante la neglektan kaj forgeseman generacion, kiu vivis senpere antaŭ li. Sur liaj kordoj resonas kurucaj sonoj, kaj lia sia profeta misio li estas logika posteulo de Petőfi, eĉ de Sándor Petőfi, kaj de tuta vico de ankoraŭ pli malnovaj profetoj. Ĉar ĉiu hungara poeto estas iom ankaŭ profeto, kaj la poezio de Ady,

de komenco ĝis fino, estas simbola revelacio de profeto. Ady estas poeto de asertantaj frazoj, kiu neniam skribis eĉ ununuran krisignon: li estas la tipa simbolista poeto, ne en la senco, en kiu la francaj simbolistoj, sed kiel la orientaj mistikuloj, aŭ ekzemple Dante. Tiu ĉi »alaŭd-masko mevo« — kiel li nomas sin — kaŝis en sia liriko simbol-sistemon de unueca Mondvizio, pli duran kaj pli komplikan, ol tiu de multaj profetoj kaj filozofoj. Tiu ĉi riĉeco de l' simboloj estas vere orienta, sed lia profetaĵo estas tute okcidenta; kaj tiu ĉi profetaĵo tamen estas profetaĵo de lirikisto, kiu ne nur heroldas la Vivon, sed kiu heroldas ĝin per la lingvo de sia propra vivo. Ĉe li ĉio estas simbolo de lia propra vivo, kaj lia vivo estas ĉies simbolo. Vere, la vivo de Ady aperas kiel simbola, antaŭdestinita vivo, kiel tiu de Dante, kaj Ady akceptas tiun ĉi rolon kun plena konscienco, al kiu la fonon kaj lumigon donas la proksimiĝanta tragedio de tuta nacio, eĉ de tuta mondparto. La destino de Ady estas flagigi la Vivon kaj la sensangajn idealojn de l' homaro eĉ dum mondruiĝo, kaj estas eterna gloro de l' hungara spirito, ke, kiam la plej kleraj spiritoj de Eŭropo, kun malmultaj esceptoj, anoncis la vortojn de l' ekstrema naciismo kaj malamo, la poetoj de tiu ĉi malgranda nacio, sub la estreco de Ady, kapablis rigardi sian individuan kaj nacian tragikon el la vidpunkto de l' Homaro, travivi la kalvarion de l' Homaro tra kaj trans sia individua kaj nacia sorto. Tion kapablis nur nacio, por kiu »Eŭropo« kaj la »Homaro« ne estis nuraj abstraktaj ideoj, sed konstantaj gvidpunktoj de ĝia historio kaj objektoj de ĝiaj tre konkretaj bataloj, kiel ĉe la hungararo. Estas certe, ke la reprezentaj spiritoj de l' hungararo estis ĉiam malproksime de bagatelaj naciaj antaŭjuĝoj, kaj ili sentas, rilate al siaj nacio-kunuloj, la komunan sorton de l' homaro: tio estas: la komunan tragedion de la malgrandaj popoloj en tiu ĉi granda mondo: »hungara, rumana, slava tristo por ĉiam restas ja sama tristo« — kiel Ady diras. Tial la poetoj de tiu ĉi nacio sentis, kaj eĉ hodiaŭ sentas sin transkreskintaj el sia raso kaj tamen sange, dolore hungaraj, kiel ankaŭ Ady.

La poetan signifon de Ady nun jam neniu kontestas, tamen krudaj kaj necesemaj disputoj okazas pri lia poezio. Antaŭ la publiko Ady staras kiel revoluciulo, kvankam lia revolucio estas vere la interna kaj suverena revolucio de la hungara animo kaj en li unuigas la plej grandaj antitezoj de tiu ĉi animo. Ady estas samtempe socialisto kaj hungara sinjoro: eble pli fierega en la sento de sia hungareco kaj sinjoreco ol la unua baron-poeto de l' XVI. jarcento; eĉ lia socialismo estas fieraj kaj sinjora. Same nur ŝajna kontraŭdiro estas la stranga simpatio de tiu ĉi vizia kaj ekstaza poeto de l' Granda Vivo al la puritana Biblio; ĉar la socialismo kaj vivanonco de la hungara poeto sin nutras el tiu

stranga kaj neŝancebla sento de digno kaj valoro de l' Homo kaj Vivo, kiu karakterizas ankaŭ la hungaran vilaĝanon, kaj en kiu certe estas io biblia. Tiu ĉi valorsento hardas Adyn en sia kontraŭstaro al Dio kaj la sorto, kiu tiun ĉi »senkrede kredantan« animon destinas en la vicon de l' plej grandaj religiaj poetoj; ĝi faras lian pozon potenca kaj tragika pozo antaŭ la grandaj tragedioj de l' okazaĵoj: ĝi klarigas lian malamon, per kiu li malamas la viv-detruan militon.

Ady sola ankoraŭ ne estas la tuta nova hungara literaturo. Ady estas nur unua granda mortinto de la falango de l' novaj poetoj kaj verkistoj, kiuj en niaj fatalaj tagoj ankoraŭ unufoje provis komuniki la anoncon de l' hungara spirito por la homaro. El kio konsistas tiu ĉi *mesaĝo* tion oni ne povas rakonti ĉi tie. Ni kredas, ke pli aŭ malpli frue ĝi trarompos al si vojon al la atento de l' mondo, kaj Eŭropo konsciigos pri la voĉo de tiu ĉi strangfata, malgranda popolo, kiu portis ĝin el la profundo de mil jaroj, tiel proksime, kaj tamen en tia malproksimo, filtrante ĝin tra ĉiam novaj kaj novaj doloraj koroj kaj pulmoj. La mesaĝo ne estas programo aŭ filozofia saĝo, prezentebila en kelkpaĝa kompendio de mallongaj vortoj: alie kial estus vivintaj kaj suferintaj aparte kapablaj animoj, ke el sia vivo kaj sufero ili amalgamu la vortojn, kiuj mankis por rakonti tiun ĉi komplikan mesaĝon? La hungaraj verkistoj, kiuj estas la plej diferencaj unu de la alia: krudaj pentristoj de l' realo kaj preskaŭ matematikaj spiritoj penetrantaj en la fantaston de l' ebloj; konservativaj artistoj estimantaj la tradiciojn de la raso kaj la barojn de la striktaj formoj, same, kiel revoluciuloj disrompantaj ĉiun baron kaj forsopirantaj ankaŭ el la baroj de sia nacieco. Sed certe en la okuloj de l' fremdulo, se li konvene ekkonus ilin, multaj el la plej konservativaj ŝajnus revolucie novaj, multaj el la plej internaci-tendencaj speciale hungaraj. Kaj el tiu ĉi specialeco kaj hungareco — kiel el la aperiga distanco de spegulo — tamen la vizaĝo de Eŭropo rerigardas al Eŭropo, kaj la vizaĝo de l' Homo al la Homo.

Mihály Babits